


Gazeto



Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

21-a Jarkolekto * Oktobro 2004 * N-ro 75

ISSN 1575-0618



10a

Andaluzia Kongreso de Esperanto

Congreso Andaluz de Esperanto

Sevilla, 31an okt. / 1an nov 2004

Kongreslibro

Gazeto Andaluzia

Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto**.

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Armengual de la Mota 33, 4-D, 29007 MÁLAGA.
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress, Córdoba.

DIRECTOR: Andrés MARTÍN GONZÁLEZ
REDACTORES: José Francisco MARTÍN DEL POZO (Apartado 5184,
29080 MÁLAGA, esperanto@ciudadfutura.com)
José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@supercable.es)

COLABORADORES: Giordano MOYA, Luis SERRANO PÉREA, José Antonio VALVERDE MARTÍN, Ángel ARQUILLOS, W. GUNTHER, Victor Manuel MACÍAS CARO, Pablo A. FOCHE PÉREZ, José ROLDÁN LEÓN. Antonio RODRÍGUEZ GASCH, Juan de Dios MONTOTO DE SARRIÁ, Manuel CASTILLO HIDALGO.

ENHAVO

10a Andaluza Kongreso de Esperanto.	3
Mesaĝo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo	5
Esperantista Grupo de Malago	6
Kordova Esperanto-Asocio	7
Jaena Esperanto-Asocio.	8
Onuba Esperanto-Asocio	9
Sevila Esperanto-Asocio	10
Prelegoj:	
- Blas Infante, Andaluzismo kaj Esperanto.	11
- Esperanto hodiaŭ	12
Programo de la Kongreso	14
Prelegoj:	
- Esperanto kaj Interreto	16
- Eblecoj instrui esperanton en la hispanaj universitatoj.	17
- Kontraŭaj opinioj kaj malfavoraj reagoj al esperanto.	18
Reĝaj Alkazaroj de Seviljo	19
Esperanto-Movado en Seviljo jaron post jaro	20
Ĉu reale du malsimilaj standardoj?	25

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.

10a Andaluza Kongreso de Esperanto

Antaŭ ne pli longe ol tri monatoj, dum unu el la kunsidoj kiuj, ĉiusemajne organizas la membroj de la Sevila Esperanto-Asocio, iu proponis la ideon aranĝi “renkontiĝon de la andaluzaj esperantistoj”.

Tiumomente okazis nenia reago aŭ komento, ĉu favoraj aŭ malfavoraj, al ĉi tiu ideo, sed io restis en la menso de ĉiuj ĉeestantoj, temis pri semo kun formo de maltrankvileco kiu kreskis rapide kaj forte, kiel Jakarando, ĝis tiu punkto kiu dum la sekvanta kunsido tiu semo jam penetrigis siajn radikojn en ĉiuj ni kaj ĉiuj alportis el sia menso kelkan projekton rilate ĝin.

Ekde tiu momento, ekkomenciĝis ege rapida kurado, plena de kunsidoj, alporto de ideoj kaj de malsamaj eblecoj, serĉado de perditaj esperantistoj, retmesaĝoj, leteroj, telefon-alvokoj, asertoj, duboj, ktp. ktp. ktp.

Finfine, post la ombro de malluma dubo, aperas la unua granda novaĵo: Andaluzia Esperanto-Unuiĝo apogos la renkontiĝon kaj partoprenis ĝin. Tiu simpla fakto, aliparte tute logika kaj necesa, inspiris al ni strangan forton kaj donis al ni la tutan certecon pri la ebleco aranĝi, ne nur simplan renkontiĝon, se eĉ, kial ne, veran Andaluzan Kongreson de Esperanto.

Ne estis malfacile trovi sufiĉajn kialojn aŭ argumentojn por pravigi la aferon. Antaŭ preskaŭ 10 jaroj oni okazigas neniun kongreson en nia regiono. Estas multaj homoj kiuj, lastatempe, alvenis en la esperanto-movadon kaj kiuj ne konatiĝas inter ili mem. Same, oni kreis dum la lastaj monatoj en Andaluzio diversajn kaj novajn lokajn esperanto-asociojn, alia estas reaktivigita ĉar ĝi dormis dolĉan sonĝon. Fine, estas evidenta kaj rulumanta forto kiu petas paŝon ke ne eblas ignori ĝin, male ni eĉ sentas la devon kanalogi kaj multobligi ĝin.

Tiumaniere, nutritaj de granda telero de iluzioj kiel unua manĝaĵo, nerompebla volo de agado kiel dua telero kaj eĉ, malgranda peco da malprudenteco, disŝprucita de kelkaj akveroj de navieco, kiel deserto, ni decidis meti manojn en tiun aferon kaj aranĝi la 10an Andaluzan Esperanto-Kongreson, dum kiu ni planis kunsidi en Seviljo al ĉiuj esperantistoj de nia regiono, kaj krome, pro la proksimeco, inviti ankaŭ la ekstremadurajn esperantsitojn.

proponis ĉeesti la kongreson, ĝis la certeco, ke ni faris tion kio devigis al ni niaj koroj kaj niaj konsciencoj.

Kongreso aranĝita en tiaj kondiĉoj naskiĝas, nepre, kun modestemo kaj humileco rilate al sia disvolviĝo kaj pretendoj, sed tute ne rilate al siaj rezultoj. “Ne estas pli riĉa tiu kiuj pli posedas sed tiu kiu malpli bezonas”.


Tamen, ni ĝuas praktikan avantaĝon rilate aliajn homojn kiuj povus havi pli grandajn celojn. Nia sola kondiĉo por konsideri ke ni atingis la plej grandan sukceson, estas la utiligo de la kongreso por la progreso de Esperanto, kaj tiu estis, do, nia plej granda zorgado dum ĉi tiuj lastaj monatoj.

Sed, ni ankaŭ ne forlasis iam la ideon, ke la kongreso ĝojos la plej bonajn eblecojn ene de nia modesteco, kaj do, ni klopodis plani renkontiĝon kie, krom la devigitaj paroladoj, oni okazigos ankaŭ aliajn agadojn, ĉu ludaj, ĉu praktikaj kaj kulturaj. Tiel, ni programis kulturalan vizitonk ekspozicion pri libroj, muziko kaj bultenoj (pri kaj en esperanto) filmprezentadojn, kunsidojn kaj kunvivadojn, ekzamenojn, tempon por praktiki la lingvon, kaj aliajn multajn ornamitajn kaj etosajn detalojn por atingi la taŭgan komfortan etoson por la merita plenĝojo de la ĉeestantoj.

Tiel do, nur restas al mi, atendi vi kaj ĝoji kune kun vi ĉi tiuj okazaĵon.

JOSÉ ROLDÁN LEÓN

Prezidanto de la Organiza Komitato de la
10a Andaluza Kongreso de Esperanto
Sevilo, 31a okt / 1a nov. 2004



10a

Andaluza Kongreso de Esperanto
Congreso Andaluz de Esperanto

Mesaĝo de ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Karaj kongresanoj:

Je nomo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, saluton. Mian koran gratulon al ĉiuj.

Mi scias pri la penado de la loka kongresa komitato kaj pri la bezonata sindediĉo. Koran dankon al Antonio Rodríguez, José Roldán, Manuel Ortega kaj José María Rodríguez konsistantaj la komitaton kaj al aliaj kunlaborantoj. Ili jam ebligis ĉi renkontiĝon; nun ni, ĉiuj, devas prizorgi ĝian sukceson kaj tiurilate eblas aserti, ke ni disponas mirindan ŝancon kompreni la nunan situacion de nia internacia lingvo kaj sekve plani realecan agadon por la senpera estonto.

Kiel prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, mi certigas al vi, ke ĉi asocio pretas helpi, subteni kaj kunlabori en ajna racia projekto celanta disvastigi kaj plibonigi nian lingvon.

AEU estiĝis en 1984. Ĝiaj celoj estas: instigado al Esperanto, disvolvo de la lingvo Esperanto, instruado de ĉi lingvo, kaj kunordigi la agadojn de la lokaj E-grupoj de Andaluzio. AEU eldonas la revuon *Gazeto Andaluzia*, la bultenon *Monate ĉe Vi*, la retan informilon *Opiniaro*, instruas la lingvon, prizorgas la aktivan ĉeeston de la lingvo ĉe sindikatoj kaj politikaj partioj, kaj laŭ eble kontaktas la andaluzajn E-grupojn. Pri sukcesoj, fiaskoj, agadplanoj okazintaj, kaj aliaj konkretaĵoj, AEU informos ĉiujn en la responda kongresa kunveno laŭ eble.

Aliflanke mi komprenas la senpaciecon kaj la bondezirojn de entuziasmaj samideanoj. Tio bonas. Tamen mi atentigas pri la jeno:

La ŝlosilo de la sukceso baziĝas sur la realo: koni perfekte la rimedojn disponeblajn, kaj la celojn atingeblajn. Plie, sen aŭtentika sindediĉo, sen sufiĉa libertempo, sen akurateco en la reciprokaj informoj eĉ la plej facile atingebla projekto fiaskas. Bonvole, atentu pri la “postkongresaĵoj” kaj rememorigu, ke la antaŭeniĝo de la lingvo neniam okazis, nek okazos, per kongresaj rezolucioj kaj promesoj, sed per la silenta kaj daŭra agado de samideanaro plenumanta la promesojn. Tio, facile komprenebla, ankoraŭ pli facile forgesebla, ĉu ne?

Ĉiam ni, **nur ni**, fosas nian sulkon. Ni iru **surpiede**.

ANDRÉS MARTÍN GONZÁLEZ

Prezidanto de
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Esperantista Grupo de MALAGO

La Esperantista Grupo de Malago fondiĝis komence de la 8a jardeko de la pasinta jarcento. Esperanto jam ekzistis oficiale en la 7a jardeko, ĉefe dank'al la streboj de la profesoro Eleuterio Moreno, kiu instruis la internacian lingvon en la lernejo kie li laboris. En la jaro 1981, dum la Hispana Kongreso de Esperanto okazinta tiam en Murcio, malaga samideano proponis sian urbon kiel sidejon por la venonta hispana kongreso. La laboroj por la organizado de tiu sukcesa kongreso estis la bazo por la Esperantista Grupo de Malago kiu ekde tiam ne lasis organizi agadojn, inter aliaj la hispanan kongreson de Esperanto ne nur de la jaro 1982 sed ankaŭ de 1995, renkontiĝon de la Hispana Esperantista Junulara Societo, multnombrajn andaluzajn kongresojn ĉu en Malago ĉu en Torokso, kursojn, prelegojn, ĝeneralajn asembleojn de AEU, radioprogramojn, ktp.

Malago estas la sidejo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj pro tio ĉiuj agadoj okazantaj en la ĉefurbo de la Suna Marbordo estas organizataj de nia regiona asocio. Inter niaj plej gravaj projektoj estas enirigi la instruadon de la internacia lingvo en la malagan universitaton kaj daŭrigi kurson ĉe sindikata sidejo.

Ni deziras al la 10a Andaluza Kongreso de Esperanto ĉiajn sukcesojn, ankaŭ la Esperantista Grupo de Malago oferos sian helpon kaj sindediĉon por la antaŭenirigo de nia lingvo en Andaluzio. Estu tiel, kaj ĉi tiu kongreso estos rekomenco por nia movado en Andaluzio.



**Grupo Esperantista
de Málaga**



Asociación Cordobesa de Esperanto Kordova Esperanto-Asocio

Kordova Esperanto-Asocio naskiĝis oficiale en la jaro 1988, tamen ĝi havas sian originon en la Grupo de Esperanto funkcianta en la Gimnazio “Seneca” de Kordovo, kie grupeto de gejunuloj decidis lerni la lingvon kaj poste instrui esperanton en diversaj centroj, ekz. nacia lernejo, klubo de amikoj de UNESKO, ktp. Nia asocio jam organizis en la jaro 1983 la 1an Andaluzan Kongreson de Esperanto kaj unu jaron poste, en 1984, renkontiĝon de la Hispana Esperantista Junulara Societo.


La lasta agado de nia grupo estis la organizado de elementa kurso de esperanto en nacia lernejo dum la jaro 2000. Nuntempe, bedaŭrinde, ni ne okazigas multajn projektojn, sed kiam oni organizas ion ni ĉiam kunordigas niajn agadojn kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Espereble, dum la venontaj jaroj ni havos la eblecon organizi novajn kursojn kaj altiri la atenton de pliaj personoj al nia lingvo kaj movado. Ni esperas ke dum ĉi tiu kongreso ni adoptos la necesajn konkludojn por eklabori por la disvastigo de nia lingvo en nia tuta Andaluzio.

Gratulon al ĉiuj ĉeestantoj.

elektronika adreso de la Kordova Esperanto-asocio:
esperanto14@supercable.es

TTT-paĝo en Interreto:
<http://es.geocities.com/esperantocordoba/>



Asociación Jiennense de Esperanto Jaena Esperanto-Asocio

Jaena Esperanto-Asocio estas asocio naskiĝinta en Jaeno kies ĉefa celo estas la uzo kaj disvastigo de la internacia lingvo esperanto kiel lingvo de paco kaj de kultura interŝanĝo kaj alproksimiĝo inter ĉiuj popoloj de la planedo.

Alia el la celoj de la asocio estas la batalo kontraŭ la lingva diskriminacio kaj la defendo de la lingvaj rajtoj de ĉiuj popoloj.

Por la plenumado de niaj celoj ni estas antaŭvidintaj aron da agadoj direktitaj al komencantoj de esperanto kiuj volas lerni la bazojn de la lingvo (bazaj kursoj de esperanto) kaj ankaŭ prelegojn kaj konversacironojn en esperanto por tiuj kiuj volas progresigi sian scipovon de esperanto.

Nuntempe, Jaena Esperanto-Asocio estas asocio kun deko da membroj kie renkontiĝas la personoj kiuj jam parolas kaj kiuj jam decidis lerni esperanton. Nia plej granda sukceso estis la okazigo de kurseto de esperanto okaze de la internacia kultura festivalo ETNOSUR, okazinta la pasintan someron en la jaena vilaĝo Alcalá la Real. Estis tiu bonega ŝanco por montri kio estas esperanto al personoj de multaj landoj kiuj venis en tiun vilaĝon por serĉi novajn vojojn por la kultura enriĉigo de la popoloj.

Ni jam kontaktis kun la Popola Universitato de Jaeno, municipa organizaĵo kiu strebas la okazigadon de kursoj kaj kulturaj agadoj far diversaj kolektivoj de Jaeno. Espereble, ni povos enirigi esperanton ankaŭ en tiu kultura centro.

TTT-paĝo en Interreto de Jaena Esperanto-Asocio:

www.esperanto-jaen.tk



Asociación Onubense de Esperanto Onuba Esperanto-Asocio

Onubo (en la kastilia Huelva) estas andaluza urbeto situanta okcidente, kiu marbordas al Oceano Atlantiko, kaj do ĝuas mildan temperaturon, sen malvarmegaj vintroj kaj varmegaj someroj, sed klimato inter subtropika kaj varmeta. La urbo troviĝas en konfluejo de du plene onubaj riveroj: la Tinto kaj la Odiel, kiu naskiĝas kaj transiras en la samnoma provinco. Onubo okupas areon de 148 kvadrataj kilometroj kaj havas pli malpli 145.000 enloĝantoj municipe kaj aliaj 100.000 en ĝia metropola areo. Nia historio estas antikvega kaj riĉa: eblas, ke ĉi tie estis la ĉefurbo de la Tartesoj, kaj poste venis ĝis ĉi tie, inter aliaj, fenicioj, romianoj, araboj kaj fine, kastilianoj. En tiu ĉi lasta epoko, okazis tre grava evento: la eliro de la ŝipoj eltrovintaj Amerikon de la haveno de Palos, sub ordonoj de Kristoforo Kolombo, al kiu oni omaĝas ĉi tie per mirindaĵoj kaj someraj festoj (Fiestas Colombinas). Ni ne povas paroli pri Onubo sen halti en ties gastronomio: ŝinkon, marbestojn, sepietojn, fromaĝojn, vinojn vi trovos se vi fine deziras viziti nin, krom la afableco de la onubanoj.

La Onuba Esperanto-Asocio estis fondata la pasintan 10an de julio de kvin onubaj esperantistoj kiuj estis jam konvenintaj de antaŭ unu monato. Ni estas do, juna grupo en la movado, sed ni jam faris kelkaj aferojn (radia intervjuo, kontakto kun aliaj onubanoj...) kaj planas aliajn por la futuro: pligrandigi nian esperantistaron, krei ret-paĝon, kunlabori kun ĵurnaloj, radiostacioj, televido, bibliotekoj... organizi esperanto-kursojn perrete aŭ vidalvide, universitate kaj mezlerneje, kolekti esperantajn kaj primovadajn librojn, kunveni por praktiki la lingvon, kontakti kaj kune kunveni kun sud-portugaloj kaj algarvanoj, verki pri Onubo kaj ties specifeco en esperantaj revuoj...

Ĉio povas esti resumita en nia ĉefa celo: "Disvastigi esperanton en Onubo, kaj Onubon per esperanto". Krome, ni volas rilati kiel eble plej fruktodone kun la andaluzaj aliskalaj neŭtralaj esperanto-asocioj.

Elektronika Adreso de Onuba Esperanto-Asocio:
EsperantoenOnubo@Egroups.msn.com



ONUBA ESPERANTO-ASOCIO
ASOCIACIÓN ONUBENSE DE ESPERANTO

Asociación Sevillana de Esperanto Sevila Esperanto-Asocio

Ekde la komenco de la 20a jarcento ekzistas en Seviljo organizita Esperanto-movado. Kaj tre aktiva estis la grupo ekzistanta ekde la fino de la 7a jardeko ĝis komence de la 9a jardeko de la pasinta jarcento. Oni agadis tiutempe ĉirkaŭ la *Academia Sevillana de Esperanto*, organizaĵo kreita de nia ne-forgesebla samideano Antolín Colmenar ĉe kiu oni instruis la lingvon al dekoj, eble centoj, da sevilanoj.

Sed komence de la 9a jardeko stagnis la Esperanto-movadon en nia urbo. Bedaŭrinde, jam ne ekzistis la akademio kaj pro tio oni ne organizis pliajn kursojn de la internacia lingvo. Sed antaŭ unu jaro grupo de novaj esperanto-parolantoj kontaktis kun kelkaj antikvaj aktivaj esperanto-movadanoj kaj denove la verda stelo ekbrilis en nia urbo.

Ni, ĉiusemajne, renkontiĝas ĉe sindikata sidejo por lerni kaj praktiki Esperanton kaj jen nia unua grava projekto en ĉi tiu nova epoko de la movado en Seviljo: la okazigo de la 10a Andaluza Kongreso de Esperanto. En la Sevila Esperanto-Asocio membriĝas preskaŭ 30 personoj, multaj el ili tre aktivaj. Ni jam trovis oficialan sidejon pruntedonita de la Sevila Urbodomo ĉe la kultura centro "Casa de las Sirenas", kie ni renkontiĝas ĵaŭde sen forgesi la sabatajn renkontiĝojn ĉe la Placo Encarnación.

Por venontaj jaroj ni deziras daŭrigi ĉi tiujn renkontiĝojn utilaj ĉefe pro pligrandigi nian membraron kaj por perfektigi nian konadon de la lingvo. Espereble ni povos rekontakti kun ĉiuj antikvaj geesperantistoj kiuj tiom laboris por la disvastigo de Esperanto antaŭ kelkaj jaroj.

elektronika adreso de Sevila Esperanto-Asocio:
esperanto_sevilo@yahoo.es

TTT-paĝo en Interreto de Sevila Esperanto-Asocio
www.sevilo.tk



PRELEGOJ

Blas Infante, Andaluzismo kaj Esperanto

Juan de Dios MONTOTO DE SARRÍA

Resumo en esperanto de la prelego okazonta en la hispana lingvo.

* Blas Infante kaj L.L. Zamenhof. Ili estis homoj kiuj faris al si zorgojn pri sia socia ĉirkaŭaĵo. Iliaj infanaj viveroj difinis siajn vivojn. Ili donis al siajn kreaĵojn naciisman internaciisman karakterizon.

* Blas Infante estis esperantisto. Lia membriĝo en la Universala Esperanto-Asocio kaj la esperanto-libroj ekzistantaj en sia biblioteko sendube tion pravas.

- Esperantistaj kaj preskaŭ-esperantistaj tekstoj en B. Infante.
- Esperantismo en la biografio de B. Infante laŭ Enrique Iniesta
- La demando pri kiam kaj kiel li lernis esperanton.
- Eblaj respondoj al tiu demando:

- 1) madrida tezo.
- 2) Esperantista tezo: la Andaluza E-Federacio.
- 3) Georgista tezo.
- 4) Anarkisma tezo.
- 5) Masonisma tezo.

* Konkludoj.

* Esperanto kiel videbla arkitekturo en la Domo de Blas Infante en Coria del Río (Sevilo).

La Preleganto

Juan de Dios Montoto de Sarría estas andaluzo ekde la jaro 1960. Liaj vivo-jaroj okupas Kadizon, Sevilon kaj Onubon. Post studi Juron li laboras en Moguer (Onubo). Li verkis artikolojn kaj prelegis aĉefe pri andaluzaj temoj. Li ekkontaktis kun esperanto en la jaro 1979. Li estis prezidanto de la Sevilja Esperantista Junulara Societo kaj de AEU. Pri la temo "Blas Infante kaj Esperanto" li jam prelegis trifoje.



El Esperanto hoy en día

Antonio Rodríguez Gasch

Resumen en castellano de la comunicación que se hará en esperanto.

Aprendimos en la escuela que el camino más corto entre dos puntos es la línea recta. En el mundo de las Ineguas, en su aprendizaje, hace tiempo que alguien escogió el camino más corto a base de atajos en los caminos (léase idiomas) ya existentes apareciendo así uno que ahorra en tiempo y en esfuerzo.

Los primeros que lo atravesaron afirmaron que además de ser un sendero lo suficientemente agradable resultaba ser de enorme utilidad el recorrerlo. Y era esto porque desde él se divisaban con claridad otros caminos aún muy lejanos (léase otros idiomas), por lo que caso de tener que recorrerlos resultaban también más fáciles.

Hoy en día ese camino tiene el mismo trazado y sigue siendo el más corto y los que lo han ido recorriendo lo han ido mejorando. Sus actuales caminantes son los que siguen aprendiendo su recorrido.

El mismo nombre de tan singular sendero explica mucho de él: “esperanto”. Un nombre claro y sonoro, fácil de pronunciar y escribir, algo fundamental hoy en día en que el mundo está al alcance de la mano y hay que evitar errores y complicaciones, donde un simple error de letra en la red de redes nos deniega información.

“Esperanto”, una palabra compuesta cuya raíz se identifica en lenguas tan influyentes y difundidas como las neolatinas con más de 800 millones de hablantes o las anglosajonas con 850 y que a su vez pertenecen a un tronco indoeuropeo con 3.500 millones.

Desde esta ciudad andaluza que es la vuestra hacemos un pequeño recorrido por ese camino y de cómo sus caminantes han sido testigos de un mundo en conflicto. Un conflicto de orden cultural y económico en el mejor de los casos al que nuestra todopoderosa Europa o las regiones de nuestro Estado no son ajenas.

El esperanto ha sido y sigue siendo ejemplo de entendimiento y neutralidad. Y para que así siga siendo, para conservar ese sendero que otros empezaron a recorrer hace mucho tiempo es por lo que estamos aquí intentando entendernos mejor con una lengua que es de todos porque no pertenece a nadie. “Estu ĉiam tiel” (que así sea siempre).

La Preleganto

Antonio Rodríguez Gasch aŭdis la unuajn vortojn en esperanto en sia lernejo. 17-jaraŝa li eklernis la lingvon aŭtodidaktike kaj poste, jam en la jaro 1982, li fariĝas membro de la Ĥis kreita Sevilja Esperantista Junulara Organizo. Li estas membro de Sevila Esperanto-Asocio, kaj ekde tiu unua renkontiĝo kun japano estis dekoj la eksterlandaj geesperantistoj kiujn li kontaktis



okaze de iliaj vizitoj en Sevilon. Li estis membro de la organiza komitato de la Hispana Kongreso en la jaro 1984 kaj de la Andaluza Kongreso en 1985. La Andaluza Esperanto-Unuiĝo komisiis lin por agadi kiel interpretisto okaze de turismaj vizitoj de pola turism-agentejo en 1988- Pro peto de Hispana Esperanto-Federacio li tradukis la tekstojn de japana pup-teatro kiuj ludis en Sevillo okaze de la Internacia Pup-Teatra Festivalo.

Li konas diversajn lingvojn, ĉefe latinaj, anglo-germanikaj kaj slavaj, kaj li interesiĝas pri klimatologio. Li laboras en la Radio-Televido de Andaluzio.

*En mia knaba aĝo, korteto de Sevilla,
maturaj or-citronoj en sun-banata horto.
En mia juno dudek da jaroj en Castilla.
En mia vivo faroj... pri ili muta vorto.*

*Ne estis mi Donjŭano nek Bradomin frivola
-vi scias, mi surportas nemodan veston ŝiman-
sed ankaŭ mi trafiĝis de l'fluga sag' Amora
kaj amis kion inoj posedas grand-anima.*

fragmento de "Memportreto" ANTONIO MACHADO
trad. Fernando de Diego

Programo de la 10a Andaluza Kongreso de Esperanto

Dimanĉon 31an de oktobro

(pri konkretaj horoj oni sciigos surloke)

Matene: ekde la 1030a horo

- Akceptado de la partoprenantoj kaj disdonado de la materialo.
- Inaŭguro de la Kongreso.
- Sinprezento de reprezentanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.
- Sinprezento de reprezentantoj de la lokaj grupoj.
 - Malago.
 - Kordovo.
 - Jaeno.
 - Onubo.
 - Sevilo.
- Prelego "Esperanto Hodiaŭ" fare de Antonio Rodríguez Gasch.
- Prelego "Esperanto e Internet" fare de Manuel Ortega Castillo.
- Prezento de la verkaĵo "Gran Diccionario Español-Esperanto" kies ekzemplero oni disdonos al la Publika Biblioteko de Sevilo.

Vespere:

- Publika Diskutado pri plenumendaj agadoj por la antaŭenirigo de la internacia lingvo en Andaluzio. Ĉiuj ĉeestantoj rajtas opinii, decidi, proponi, aprobi, ktp. Vidu venontpaĝe la traktotajn temojn.
- Prelego "Reacciones negativas y miedos al esperanto" fare de Victor Manuel Macías Caro.
- Prelego "Eblecoj instrui esperanton en la hispanaj universitatoj" fare de José María Rodríguez Hernández.
- Ekzamenoj elementa kaj meza.
- Distraĵoj (muziko en esperanto, filmo-projekciado, ktp).

Lundon 1an de novembro

Matene:

- Prelego "Blas Infante, Andalucismo y Esperanto" fare de Juan de Dios Montoto de Sarriá.
- Disdonado de diplomoj al la sukcesantaj ekzamenintoj kaj al la prelegintoj.
- Legado de la konkludoj de la kongreso.
- Fermo de la Kongreso.

- Turisma vizito al la Reĝaj Alkazaroj.

Okaze de la publika diskutado pri plenumendaj agadoj por la antaŭenigo de la internacia lingvo en Andaluzio oni pritraktos jenajn temojn:

- Instruado de esperanto, ĉeestantaj kursoj, per-korespondaj, universitatoj, per-interreto.
- Esperantaj publikaĵoj en Andaluzio: *Gazeto Andaluzia*, *Monate* kaj *Opiniaro*.
- Andaluza Esperanto-Movado en Internet.
- Kiel altiri la atenton de aliaj esperantistoj de Andaluzio kaj kreskigi la nombron de membroj de la E-asocioj en Andaluzio.
- Disvastigo de Esperanto en la provincoj kie ne ekzistas organizita E-movado.
- Kunlaboro inter la lokaj grupoj kaj la andaluzia unuiĝo.
- Agad-programoj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo:
 - Esperanto en sindikatoj kaj partioj.
 - Esperanto en Bibliotekoj.
 - Helpo al la UEA-delegitoj en Andaluzio.
- Petoj kaj Proponoj.

Esperanto kaj Interreto

Manuel Ortega Castillo

Resumo en esperanto de la prelego okazonta en la hispana lingvo.

Aktuale Interreto revolucias la manieron komuniki kun la Ekstera Mondo kaj ĝi malgrandigis ĉiujn distancojn kiujn la geografio starigis antaŭ ni. Kiam ni havas komputilon kaj interretaliron ni povas atingi kiun ajn parton de la mondo. Sed atingi tiun informon ne signifas ĝin kompreni. Ĉi-kaze estas kiam tiu mondskala komunumo limiĝas je nia lingvo. Ĉi tiu mondskala komunumo realiĝas per esperanto. Kiam ni uzas esperanton estas kiam ni reale povas kontakti kaj interagi kun kiu ajn parto de la mondo.

La preleganto

Manuel Ortega Castillo naskiĝis en la jaro 1984 en la urbo Barquisimeto (Venezuelo). Li loĝis tie ĝis sia 17a-vivjaro, tie li abiturientiĝis je sciencoj. Aktuale li laboras kaj studas en Sevilo. Li esperantiĝis en septembro 2003 pere de Interreto kaj poste praktikis la lingvon en ĉi tiu andaluza urbo. Liajn plej internaciajn kontaktojn li atingis en Portugalio kaj en Bilbao ĉiam pere de esperanto.



En Lisbono li partoprenis en prelego pri la Internacia Televido kaj en Bilbao en la ĵusa 6a Eŭrop-unia Esperanto-Kongreso.

Noktiĝis;

Seviljo nun kuŝas en dormo.

El parkoj kaj ĝardenoj leviĝis la parfumoj,

Narkotige dolĉe aeron saturante,

Kaj supre ekvekiĝis arme' de milmil lumoj.

Fajreras ili, fulmas kun brilo nevidita,

Kun pompo neaŭdita –ĉielaj diamantoj;

Gardas kaj rigardas la strangan teromondon,

Miradas pri la homoj, en dolĉa dorm' sonĝantaj.

fragmento de “Kanto al Seviljo”

originale verkita en esperanto de TEO JUNG.

Posibilidades de enseñar esperanto en las universidades españolas

José María Rodríguez Hernández

Resumen en castellano de la comunicación que se hará en esperanto.

Desde siempre las asociaciones esperantistas han intentado introducir la enseñanza del idioma internacional en los planes de estudio de colegios y centros de enseñanza media. El que las universidades españolas no contemplaran en ningún caso la existencia de una carrera o incluso de una asignatura que tratara sobre el interlingüismo provocaba que el esperanto ni siquiera fuera mencionado en ningún plan de estudio universitario. La modificación legislativa experimentada en los últimos años en nuestro país, por la que se modifican los planes de estudio de las universidades clasificando en tres los tipos de asignaturas a los que debe de enfrentarse un universitario español, puede suponer una vía de entrada para la enseñanza del esperanto, y de multitud de otras materias, en la universidad. En concreto se hace un estudio en esta comunicación sobre las asignaturas de libre configuración, entre las que ya se encuentra la enseñanza del esperanto en 4 universidades españolas (La Laguna, País Vasco, Autónoma de Barcelona y Valencia).

Por último se hace un estudio sobre las posibilidades de introducir el esperanto en los planes de estudio en centros como la UNED, los Institutos Universitarios de Idiomas, las Escuelas Oficiales de Idiomas, las Universidades de Verano, etc.

La Preleganto

José María Rodríguez Hernández naskiĝis en Martos (provinco Jaeno) en la jaro 1964. Li loĝas nun en Kordovo, kie li laboras en la ŝtata administracio. Antaŭe li loĝis en Jaeno, Sevilo kaj Karmono. Esperanton li konis en la jaro 1980 kaj tuj li formis grupon en la gimnazio kie li studis. Li kunlaboris en la organizado de la 1a Andaluza Kongreso de Eo kaj en la 8a Renkontiĝo de la Esperantista Junularo de Hispanio. Li studis Juron kaj nuntempe preparas sian doktorigan tezon pri Internacia Juro.



Reacciones negativas y miedos al esperanto

Victor Manuel Macías Caro

Resumo en esperanto de la prelego okazonta en la hispana lingvo.

La preleganto prezentos serion da negativaj reagoj kaj timoj rilataj al Esperanto tre ofte troveblaj en kelkaj homoj kaj provos analizi la kialojn por tiaj elmontoj de neracia malamikeco kaj doni ideojn al ĉeestantoj por kontesti ilin se necese. En la fino, ĉiuj devus konigi al la aliaj spertojn prie. La temo baziĝas sur la fama artikolo "Psikologiaj reagoj al Esperanto" de Claude Piron kaj, por la kontestoj, sur la raporto "Pro Esperanto" eldonita de HEF.

La Preleganto

Victor Manuel Macías Caro naskiĝis en Onubo en la jaro 1985. Li eklernis la lingvon esperanton en la jaro 2000. Li estas membro de SAT en Hispanio, de Hispana Esperanto-Federacio kaj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Li estas kunfondinto de la Onuba Esperanto-Asocio en la pasinta monato julio.



De la pasinta jaro li studas Juron ĉe la Onuba Universitato. Li emas politikon, kinarton kaj legi.

La 31an de oktobro okazos, je la 8a horo vespere, elementa kaj meza ekamenoj. Se vi deziras ekzameniĝi bv. sciigi pri tio al kelka membro de la organiza komitato. Memoru, ke tiuj kiuj aprobos la ekzamenon ricevos diplomon dimanĉe matene. Temas pri diplomo donita nome de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Reĝaj Alkazaroj de Sevilo

La kristanaj reĝoj Alfonso la 10a “la saĝulo” kaj Petro la 1a “la kruelulo” (en Sevilo oni preferas nomi lin “la justulo”) dungis maŭrajn konstruistojn por starigi la Reĝan Alkazon de Sevilo dum la 14a jarcento, ĝuste sur la loko kie antaŭe starigis la antikva araba alkazaro, kies restaĵoj ankoraŭ videblas en la korto de la “Yeso”. La Palaco konstruita sub la ordonoj de Petro la 1a estas konsiderata kiel la plej bela ekzemplo de la mudehara arkitekturo.



Tra la pordo de la Leono oni eniras en la korton de la “Monteros” kiu ricevas sian nomon de la asistoj kiuj akompanis al la reĝo okaze de la asoj kie li partoprenis. Promenante tra longaj koridoroj kaj salonoj ornamitaj de azulejoj

kaj plafonoj mudeharaj oni eniras en la korton de la “Doncellas”, kiu estas la ĉefa korto de la Palaco. La plej gravaj salonoj de la fortreso, tio estas la salono de la Reĝoj, la salono de Karolo la 5a kaj la salono de la Ambasadoroj malfermas siajn pordojn al ĉi tiu korto.

Ĉi tiu lasta salono, de la Ambasadoroj, estas la plej grava de la Alkazaro kaj ĝi utilis por ricevi la ambasadorojn de aliaj regnoj kiam la kastilia reĝo troviĝis en Sevilo. Apud tiu loko troviĝas la salono de la Pupoj, memoru, ke la kutimo en ĉi tiu salono estas serĉi la vizaĝon de pupo gravurita en unu el la kolonoj, pro tio la salono ricevas tiun nomon. Ha! Ne forgesu, se vi trovas tiun gravuraĵon vi estos bonŝanca.

La lasta vizitinda loko estas la ĝardenoj de la Alkazaro, kie vi povos vidi kuriozan miksiĝon de diversaj ĝarden-stiloj (franca, araba kaj renacenza). Ĝuu vian viziton!

Esperanto-Movado en Sevilo... jaron post jaro.

- 1910.** Trinidad Soriano kaj Manuel Calderón Pacheco organizas elementan kurson de esperanto. Ĉeestas 37 gelernantoj. Inter ili troviĝis Rafael Fiol Paredes.
- 1911.** La 2an de oktobro oficialiĝas la Grupo Esperantista de Sevilo.
- 1912.** La Grupo Esperantista starigas propran budon en la Aprila Foirejo.
- 1913.** Trinidad Soriano proponas la ideon krei Andaluzan Esperanto-Federacion. 11 esperantistoj renkontiĝas en Sevilo por pritrakti la aferon.
- 1914.** Trinidad Soriano kaj Karolo Martínez, sevilaj esperantistoj, planas ĉeesti la Universalan Kongreson de Esperanto en Parizo. La eksplodo de la unua mondmilito malfaciligas ilian revenon en Sevilon.
- 1915.** En artikolo verkita de Karolo Martínez en madrida ĵurnalo oni elstarigas la laboron de la E-movado kunlabore kun la Ruĝa Kruco favore al la soldatoj malliberigitaj dum la milito en Eŭropo.
- 1916.** La ĉeka esperantisto S-ro Cirm vizitas Sevilon. La sevilaj esperantistoj bonvenigas lin per festo en la monato novembro.
- 1917.** La 18an de aprilo la andaluzaj esperantistoj renkontiĝas en Sevilo okaze de la 1a Kongreso de la Andaluza E-Federacio.
- 1918.** La 21an de aprilo okazas en Sevilo la 2a Andaluza Kongreso de Esperanto. Prezidas la kunvenon Trinidad Soriano.
- 1919.** Okazas en la Societo de Amikoj de la Lando en Sevilo la 3a Andaluza Kongreso de Esperanto.
- 1920.** Forpasas la S-ro Trinidad Soriano, animo de la Grupo Esperantista de Sevilo.
- 1921.** Karolo Martínez proponas en du sevilaj ĵurnaloj la eldonadon de turismaj broŝuroj en esperanto por promocii la estontan Iberoamerikan Ekspozicion.
- 1922.** Renkontiĝas en Sevilo komitato kun reprezentantoj de 8 lokaj grupoj de Andaluzio por reorganizi la andaluzajn kongresojn de Esperanto.
- 1923.** La 6an de majo okazas en Sevilo la 4a Andaluza Kongreso de Esperanto. Prezidas ĝin la kordova S-ro Olmo.
- 1924.** Reprezentantoj de la esperantistaj grupoj de Sevilo, de Villanueva del Río y Minas kaj de Tocina partoprenas en la 4a Hispana Kongreso de Esperanto kiu okazas en Bilbao.
- 1925.** La Grupo Esperantista de Sevilo kunlaboras kun la Ateneo en la Festo de la Magoj. La esperantista grupo donacas pupojn vestitaj laŭ la kutimoj de malsimilaj landoj al la sevilaj orfoj.

1926. La Hispana Esperanto-Asocio kreas la Hispanan Instituton de Esperanto, kie renkontiĝas la plej prestiĝaj esperantistoj. Unu el la unuaj nomumitaj estas Karolo Martínez de Sevilo.

1927. Prezidas la Grupon Esperantista de Sevilo ilustrano sevilano, la Pastro Jerónimo de Córdoba.

1928. De la 5a ĝis la 9a de novembro okazas en Sevilo la 7a Hispana Kongreso de Esperanto. Partoprenas 200 geesperantistoj.

1929. Okaze de internacia konkurso pri lernejoj artaĵoj kunvokita de esperantsita asocio atingas la duan premion la Nacia Lernejo de Gilena (Sevilo).

1930. Okaze de la diskutoj por subteni hispanan asocion kun sidejo en Madrido aŭ krei hispanan konfederacion, la Grupo Esperantista de Sevilo voĉdonas favore al la fondiĝo de Hispana Konfederacio.

1932. La esperantisto Henriko OGER, partoprenanta en la Hispana Kongreso de Esperanto, prezentas sian projekton "Tri urboj por la Paco", laŭ tiu projekto la esperanto-grupoj de Barcelono, Madrido kaj Sevilo favorigos la okazigon de agadoj en tiuj urboj favore al la internacia paco.

1933. La Grupo Esperantista de Sevilo estas la membro 4.614 de la Universala Federacio Esperantista.

1935. La Hispana Esperantista Asocio gratulas la Grupon Esperantistan de Sevilon pro la sukceso de ĝiaj agadoj favore al la disvastigo de la internacia lingvo.

....

1950. Oni elektas la novan estraron de la Hispana Esperanto-Federacio, fondita en la jaro 1948. La sevila Federico Ribelles Giménez estas la nova vicprezidanto.

1951. Grupo de italaj esperantistaj turistoj vizitas Sevilon dum la monato majo.

1952. En la nova estraro de la Hispana Esperanto-Federacio aperas kiel voĉdonanto la sevila S-ro José María Arias de Reyna Ferrero.

1957. La sevila Francisco Abascal Fernández kunlaboras en la administrado de la Hispana Esperanto-Federacio.

1959. La partoprenantoj en la 20a Hispana Kongreso de Esperanto okazanta en Malago vizitas Sevilon. S-roj Rafael Fiol kaj Karolo Martínez akompanas al ili.

1960. La sevila Karolo Martínez publikigas artikolon pri Unesko kaj Esperanto en la prestiĝa kultura revuo "La Kuriero de Unesko".

1961. En la monato junio la sevila ĵurnalo "El Correo de Andalucía" publikigas longan kaj interesan artikolon de la D-ro Arranz pri Esperanto.

1962. En la monato septembro Teo Jung, fondito kaj direktoro de "Heroldo de Esperanto" vizitas Sevilon. S-ro Rafael Fiol montras al li kaj al lia familio la mirindaĵojn de la urbo.

- 1965.** La revuo BOLETIN, organo de Hispana Esperanto-Federacio intervjuas al la sevilano esperantisto S-ro Carlos Martínez Fernández "Karolo".
- 1966.** La revuo BOLETIN intervjuas la sevilano esperantiston S-ro Rafael Fiol Paredes.
- 1967.** En la adresaro eldonita ĉi-jare de Hispana Esperanto-Federacio aperas 5 sevilanoj.
- 1968.** Du sevilanoj, S-roj Felipe González del Pino kaj Carlos Martínez Fernández, partoprenas en la 53a Universala Kongreso de Esperanto okazanta en Madrido.
- 1969.** Hispana Esperanto-Federacio eldonas "La Lando de Alvargonzález", tradukaĵo de Fernando de Diego de la verkaĵo de la sevilano Antonio Machado.
- 1970.** La sevilanoj Rafael Fiol kaj Carlos Martínez donacas 300 librojn, preskaŭ ĉiuj publikigitaj inter la jaroj 1904 kaj 1912, al la Biblioteko de la Hispana Esperanto-Federacio.
- 1971.** La profesoro Felipe González del Pino atingas la necesan rajtigon de la Provinca Delegito de la Ministerio pri Edukado por organizi esperanto-kurson en la Gimnazio "San Isidoro" en Sevilo. Partoprenis 40 lernantoj.
- 1973.** Fernando de Diego prezentas sian tradukon en esperanton de verko de la sevilano Gustavo Adolfo Bécquer en sia nova libro "Kun Sopira Koro".
- 1974.** La sevilano esperantisto S-ro Rafael Fiol Paredes lanĉas demandon pere de la revuo BOLETIN por koni kiu estas la plej veterana esperantisto en Hispanio. De la atingitaj sciigoj oni sciis, ke li mem estus la plej veterana samideano en Hispanio.
- 1975.** Felipe González del Pino ekorganizas kurson de esperanto en la Nacia Lernejo "José María Izquierdo".
- 1976.** La 16an de februaro, ĉe sidejo pruntedonita de Tomás Caspe Cereijo, oni inaŭguras la Sevilano Akademion de Esperanto. Dum la unua jaro ĉeestis 70 gelernantoj.
- 1977.** Grupo de junaj lernantoj de la Sevilo Akademio de Esperanto eldonas la revuon "Andalucio".
- 1978.** Okaze de la restrukturigo de la Hispana Esperanto-Federacio, ĉi tiu federacio nomumas delegiton en Andaluzio la sevilano Tomás Caspe Cereijo.
- 1979.** Malgraŭ la fakto ke en ĝi ne aperas specife la vorto "Esperanto", la Granda Enciklopedio de Andaluzio, eldonita ĉi-jare en Sevilo, informas pri José Garzón Ruíz, aŭtoro de kelkaj libroj en esperanto kaj fondinto de la revuo "Gazeto Andaluzio".
- 1980.** La S-ro Rafael Fiol Paredes, delegito en Sevilo de la Universala Esperanto-Federacio, estas nomumita honora membro de la Hispana Esperanto-Federacio.

- 1981.** La inform-programo TeleSur, de la sidejo en Sevilo de la Hispana Radio-Televido, intervjuas al kelkaj sevilaj partoprenantoj en la tiujara Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en Murcio.
- 1982.** La nova asocio SEJO (Sevilja Esperantista Junulara Organizo) eldonas novan publikaĵon “Revuo de SEJO”.
- 1983.** Post partopreni en la 1a Andaluzia Kongreso de Esperanto, okazinta en Kordovo, kvar radio-elsendejoj intervjuas al sevilaj esperantistoj.
- 1984.** Okazas en Sevilo la 44a Hispana Kongreso de Esperanto. La Sevila Urbodomo eldonas turismajn broŝurojn en esperanto.
- 1985.** Okazas en Sevilo la 3a Andaluzia Kongreso de Esperanto sub la temo “La informadiko kaj Esperanto”.
- 1986.** Komenciĝas en la sidejo de la Sevila Akademio de Esperanto la “-aŭdaj Parolhoroj”. Temis pri mallonga prelego kaj posta debato kiu ĉiuĵaude organizis malsimila membro de la akademio. La lingvo uzita estis esperanto.
- 1987.** La sidejo de la Hispana Esperantista Junulara Societo translokiĝas al Sevilo. Alberto Franco Ramírez estas la nova prezidanto de tiu junulara asocio.
- 1988.** En la monato februaro komenciĝas nova elementa kurso en la Akademio. La sevila ĵurnalo ABC informas pri tiu kaj aliaj agadoj favore al esperanto en Sevilo.
- 1989.** La estraron de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo prezidas ekde tiu jaro la sevila Juan de Dios Montoto de Sarriá.
- 1990.** Forpasas la S-ro Rafael Fiol Paredes, la memoro de la esperanto-movado en Sevilo.
- 1991.** Forpasas la S-ro Tomás Caspe Cerejjo, la ne-forgesebla Antolín, la regorganizanto de la esperantista movado en Sevilo dum la 7a jardeko.
- 1992.** La reklamo de la nova parfumo “Agua de Sevilla” bonvenigas al la vizitantoj de la Universala Ekspozicio pere de la ĵurnalo ABC en diversaj lingvoj. “Estu bonvena!” aperas inter ili.
- 1994.** Alberto Franco Ramírez organizas elementan kurson de esperanto en la Universitato de Sevilo.
- 1996.** La sevila libro-vendejo Interbook ekvendas la novan libro-metodon de esperanto verkita de Miguel Gutiérrez Adúriz “Curso de la Lengua Internacional Esperanto”
- 1997.** Oni ekuzas la unuan elektronikan adreson de la esperanto-movado en Sevilo, espersev@arrakis.es
- 1998.** Okaze de la 18a Internacia Pup-Teatra Festivalo okazanta en Sevilo, la japana ensemblo Shonai Dewa Ningyo Shibai prezentas sian spektaklon en esperanto. Antonio Rodríguez, esperantisto de la sevila grupo, tradukas la eldiraĵojn en la hispanan al la publiko.
- 1999.** Aperas la TTT-paĝo en Interreto “Andaluzia Reto” por informi pri la internacia lingvo el Sevilo.

2000. Andaluzia Esperanto-Unuiĝo aprobas, ene de sia programo “Esperanto en Bibliotekoj”, donaci ekzempleron de libro-metodo en esperanto al publikaj bibliotekoj de pli ol 10 vilaĝoj en Sevilo.

2001. Malgranda grupo de esperantistoj renkontiĝas ĉiusemajne en la “Ateneo Verde”.

2002. La 2an de septembro aperas artikolo en la ĵurnalo “Diario de Sevilla” sub la titolo “Recuperar el Esperanto” kie oni informas pri la agadoj de la S-ro Juan de Dios Montoto por atingi konitaĵojn pri la historio de la esperantomovado en Sevilo.

2003. La 20an de septembro Juan de Dios Montoto de Sarriá prelegas ĉe la Centro pri Hispan-amerikaj Studoj en Sevilo pri la temo “Blas Infante kaj Esperanto”.

2004. Oni reorganizas la Sevilan Esperanto-Asocion. Okazas en la kultura municipa centro “Casa de las Sirenas” la 10a Andaluza Kongreso de Esperanto.

Al Sudo,

Al Suno min tiras sopiro,

Al paradizaj parkoj, je bonodoroj plenaj:

Ĉarme alridetas ĝardenoj Alkasaraĵ,

Ĉielen palmoj celas majestaj kaj serenaj.

Ho Alkasaro, verko de majstro senkompara,

Ho parkoj, ho florujoj, sveniga bonodoro!

Vintro nun ekregis ĉe ni, mi frostotremas-

Mi volus rozbukedojn, kaj varmon por la koro.

Fragmento de “Kanto al Seviljo”
originale verkita en esperanto de TEO JUNG.

Ĉu reale du malsimilaj standardoj?

Ekzistas malmultaj eblecoj vidi flirti la du standardojn: tiu andaluza kaj tiu de la esperanto-movado. Ni, kiel andaluzaj esperantistoj, konas perfekte ambaŭ simbolojn kaj tutcerte surprizigas al ni la fakto, ke ambaŭ flagoj posedas la samajn kolorojn: tio estas la blanka kaj la verda.

Oni diras, ke la andaluza standardo flirtis unuafoje kiam la 18a de julio de la jaro 1198 la sultano Ben Jusuf Jakub venkis la trupojn de la reĝo Alfonso la 8a en la batalo de Alarcos. La historio rakontas, ke li atingis grandajn predojn kaj kaptis 5000 malamikajn soldatojn. Por soleni tiun venkon li decidis pendumi verdblankan standardon en la turo de la granda moskeo de Seviljo, tie kie nun stariĝas la Hiraldo. Laŭdire la blanka kaj verdaj koloroj signifis la almohadojn (blanka) kaj la omejojn (verda). Nur la unuiĝo kaj kunlaboro de tiuj du arabaj popoloj ebligis la venkon.

Ankaŭ estis blankaj kaj verdaj la standardoj uzitaj de la Duko de Medina Sidonia kaj de Tahir al Horr okaze de ilia lukto kontraŭ la kastilia reĝo dum la 17a jarcento. Dum la 19a jarcento oni uzis en Andaluzio blankverdajn standardojn, sed ankaŭ oni adiciis la ruĝan (revolucia koloro) kaj la nigran (anarkisma). Sed definitive la Andaluzisma Asembleo de Rondo en la jaro 1918 adoptis la tristrian standardon –verda,blanka kaj verda- kiel la oficialan simbolon de Andaluzio. Tio diras ankaŭ nia aŭtonomia statuto. Krome, la teksto de la andaluza himno tion proklamas *“la blanka kaj verda standardo revenas post militaj jarcentoj dirante pacon kaj esperon sub la sun’de nia tero”*. Do, la andaluza standardo uzas la kolorojn blankan kaj verdan, ĝia signifo estas la paco kaj la espero.

Kio okazas rilate la esperanto-standardon? Nu, en 1905 la francoj Michaux, Sergeant kaj Duchochois, ĉefaj organizantoj de la Universala Kongreso okazunta en Bolougne sur Mer, decidis krei oficialan standardon por tiu renkontiĝo. Ili bazis sian projekton en la jam ekzistanta esperanto-simbolo, t.e. la kvin-pinta verda stelo sur blanka fono, kies signifo estis la espero ĉirkaŭigita de la paco en la kvin kontinentoj (la kvin pintoj signifus la 5 kontinentojn). Unuamomente la tri organizantoj decidis meti ankaŭ la tri kolorojn de la franca standardo, tamen por ne naciigi internacian simbolon ili decidis plenigi nur per la verda koloro la ceteran parton de la flago. La adopto de tiu kongresa simbolo estis ege sukcesa kaj dum ĝi oni decidis, ke la standardo de la esperanto-movado estus estontece tiu de la 1a Universala Kongreso, tio estas: la blanka kaj verda standardo kies signifo estus la paco kaj la espero.

Ni, andaluzaj esperantistoj, bonŝancas, pro la fakto, ke ni havas du belajn standardojn, tamen ĉu reale du malsimilaj? Jes, sendube temas pri du malsimilaj simboloj, sed se temas pri la signifo de ambaŭ flagoj ni povus aserti, ke temas pri la sama standardo; tiu de la Paco kaj la Espero.

N o t o j

La Espero

En la mondon venis nova sento,
Tra la mondo iras forta voko;
Per flugiloj de facila vento
Nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
Ĝi la homan tiras familion:
Al la mond' eterne militanta
Ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
Kolektiĝas pacaj batalantoj,
Kaj rapide kreskas la afero
Per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
Inter la popoloj dividitaj;
Sed dissaltos la obstinaj baroj,
Per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
En laboro paca ne laciĝos,
Ĝis la bela songo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.

Himno de Andaluzio

La standardo blanka kaj verda
venas re post militjarcentoj
por diradi pacon, esperon
sub la sun' de nia tero

Andaluzoj, ekstarigu
teron kaj liberon petu ja
estu per Andaluzi' liberaj
Hispana land' kaj la Homar'

Ni andaluzoj volas
esti re kio ni estis
homoj lumaj kiuj al homoj
homajn animojn oferis.

Andaluzoj, ekstarigu
teron kaj liberon petu ja
estu per Andaluzi' liberaj
Hispana land' kaj la Homar' .

Trad. Rikardo F. Albert

